Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

39-a Jarkolekto - Junio 2025 - N-ro 137

BARBATE (Kadizo)

Aprilo / Junio 2025

Enhavo

P. 03 Esperanto en Andaluzio.
P. 07 600 jaroj de la alveno de la cigana popolo en la Iberan Duoninsulon.
P. 10 Lingva Angulo: ***El infinitivo cuando actúa como sustantivo.***
P. 14 Poezia Angulo.
P. 15 Nuntempa Vortaro: ***Vintraj Olimpikoj***
P. 17 Folioj por Praktikado.
P. 21 Turismi en ... ***Barbate (Kadizo)***
P. 25 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: ***Elisa López Velasco, malaga instruistino.***
P. 27 Humuro.
P. 28 E=mc² Scienca Angulo: ***La koincidantaj punktoj de Schelling.***
P. 30 Flamenko: ***Rafael Amador Fernández.***
P. 32 Fervojista angulo: ***La linio 3-a de la Sevila Metroo.***
P. 34 Komikso: ***La Barilo.***
P. 41 Ĵus aperis!
P. 42 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.
P. 44 Ŝako: ***Aroko.***
P. 46 Skolta Mondo.
P. 48 Andaluzia Kuirarto: ***Kalmaroj laŭ la malaga stilo.***
P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: ***La Domoj de la Turoj en Ubedo.***
P. 52 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Sur la kovrilo:
Vidaĵo de Barbate (Kadizo)

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Zamenhofa Festo en Sevilo - Decembro 2025

La pasintan 15an de decembro Sevila Esperanto-Asocio festis la tradician Zamenhofan Tagon. Ĉi-foje la festo okazis en restoracio ĉe la urbo-centra San Lorenzo-placo.

Apenaŭ estis libera spaco por tiuj 11 homoj ĉeestantaj. Krom anoj de la asocio, ĉi-jare alvenis ankaŭ eksaj membroj plus lernantoj de la nuntempaj E-kursoj en la Universitato.

Post festparolo de la prezidanto, komenciĝis ĝuado de bongustaj pladoj. Aŭdiĝis oftaj ridoj ĉar la etoso estis vere ĝojplena. Kiel kutime, sur la manĝo-tablo troviĝis zamenhofa bongusta torto.

Partoprenantoj en la Zamenhofa Festo organizata de
Sevila Esperanto-Asocio. Decembro 2025

En Oktobro 2026 okazos en Malago la 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto

KOVIM-19 haltigis la okazigadon de andaluziaj kongresoj de esperanto. Tamen, la estraro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĵus decidis meti finan punkton al tiu ne-okazigado de andaluziaj kongresoj. Tiel, de la 10-a ĝis la 12-a de oktobro 2026 okazos en la urbo Malago la 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto.

Reale temos pri du esperantistaj renkontiĝoj, pro la fakto, ke la asocio Esperanta Naturamikaro ankaŭ decidis okazigi kunvenon dum tiuj tagoj. Kvankam la programo ankoraŭ ne estas decidita, verŝajne multaj programeroj pritraktos temojn ĉirkaŭ naturo kaj ekologio. Same, pravideblas ekskursoj al "Caminito del Rey" kaj al la urbo Nerho (hispane: Nerja).

Promenado tra la "Caminito del Rey" estos alloga ekskurso dum la 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto - Malago, oktobro 2026.

Por faciligi la ĉeestadon kaj partoprenadon de kiel eble plej granda nombro de esperantistoj, organizantoj jam pripensis okazigi la kongreson ĉe la Casa Diocesana de Malago. Temas pri la sama loko kie okazis la hispana, andaluzia kaj fervojista E-kongresoj en la jaro 2019. Avantaĝoj de tiu kongresejo estas la faktoj, ke estas eble tranokti kaj manĝi ĉe la sama loko kie okazas la plejmulto el la programeroj.

Ni pli-informos pri ĉi tiu 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Vi nun devas noti en via kalendaro jenajn tagojn:

10-a / 12-a oktobro 2026 Andaluzia Kongreso de Esperanto en Malago.

Nova numero de la revuo *VENTO*

Vi probable scias, ke VENTO estas la sola revuo eldonita en esperanto, kiu pritraktas veksilologiajn temojn. Veksilologio estas konata ankaŭ kiel flagoscienco. VENTO estas eldonita, ĉi tie en Andaluzio, de grupo da homoj kiuj interesiĝas pri flagoj kaj standardoj.

Ĉi tiu numero jam estas la 13-a kaj la ĉefa temo de la revuo ĉi-numere estas la historio kaj signifo de la pirata flago. Kompreneble, kelkaj aliaj standardo estas pristudataj.

Se Vi deziras legi ĉi revuon, kaj eĉ la 12 numerojn antaŭajn, sciu, ke legado de VENTO estas tute libera kaj senpaga ĉe https://www.esperanto.ac/vento

Daŭriĝas la kurso de esperanto en la Universitato de Sevilo

Dum la universitata jaro 2025/2026 daŭriĝas la kurso de la internacia lingvo esperanto en la Universitato de Sevilo. Klasoj okazas ĉe la Fakultato pri Turismo kaj Financoj, vendrede de la 18-a ĝis 20-a horo. Profesoroj estas Antonio Rodríguez kaj Fernando Estepa, ĉiuj lecionoj estas video-registritaj por tiuj lernantoj kiuj iufoje ne povas ĉeesti.

REAKTIVIĜIS LA BANKO-KONTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Post kelkaj problemoj kun la banko okaze de la administrado de nia banko-konto, ni plezure informas al niaj membroj kaj simpatiantoj, ke la banko-konto:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Reaktiviĝis!

Se vi apogas kaj deziras kunlabori kun la Esperanto-movado en Andaluzio, ni proponas al vi membriĝi en Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La jara kotizo estas 20 €, pageblaj en tiu banko-konto. Ni petas al vi, post la pago, sendi ret-mesaĝon al *info@esperanto.ac*, por informi pri la pagita kotizo. Multan dankon kaj ni kalkulas kun via kunlaborado.

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

VUELVE A ESTAR ACTIVA LA CUENTA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

Después de algunos problemas con la entidad bancaria por la gestión de nuestra cuenta bancaria, anunciamos a todos nuestros socios y simpatizantes que la cuenta:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

¡ Vuelve a estar activa !

Si apoyas y quieres colaborar con el movimiento esperantista en Andalucía, te invitamos a hacerte miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto. La cuota anual es de 20 €, que puedes abonar en la cuenta antes indicada. Te rogamos que tras hacer el pago envíes un correo electrónico a *info@esperanto.ac*, informando del abono de la cuota. Muchas gracias y contamos con tu colaboración.

600 jaroj de la alveno de la cigana popolo en la Iberan Duoninsulon

La 12-an de januaro 1425 la aragona reĝo Alfonso la 5-a, konata kiel "la Grand-anima", liveris rajtigon al Sro Juan de Egipto Menor kaj akompanantaro. Laŭ la teksto de tiu dokumento, la reĝo bonvenigis tiujn vojaĝantojn, kiuj deziris pilgrimi al Santjago de Kompostela. Laŭlitere oni diris:

> *" Ni volas, ke ili estu bone akceptitaj, se male, tio kaŭzus la justan koleron de la reĝo. Tiel, la dirita S-ro Juan de Egipto kaj lia akompanantaro, kun iliaj ĉevaloj, vestoj, havaĵoj, oro, arĝento, sel-sakoj kaj kio ajn al ili apartentantaj, rajtas trapasi kiun ajn urbon aŭ vilaĝon de nia regnolando, kaj pro tio ili ricevas nian protekton kaj sekurecon."*

Laŭdire, en la jaro 1435 tiu unua grupo de ciganoj alvenintaj en Hispanion troviĝis en Santjago, ili poste vagadis tra la tuta Ibera Duoninsulo. Tiel, en la jaro 1462 ili troviĝis en Andaluzio, ĝuste en Jaeno, tie ili estis tre bone akceptitaj.



Pas-permeso liverita de la reĝo Alfonso la 5-a al S-ro Juan de Egipto kaj akompanantaro. La dokumento troviĝas en la Arĥivo de la Aragona Regnolando en Barcelono.

La nomo de ĉi tiu gento en la hispana lingvo "*gitanos*" devenas ĝuste el tiu unua grupo de ciganoj, kiuj alvenis en Hispanion. S-ro Juan de Egipto prezentiĝis kiel "Duko de Minora Egipto", tiama geografia nomo de la nuntempa turka regiono. Do, ili estis "*egiptanos*", vorto kiu transformiĝis en "*gitanos*". Al ili aldoniĝis poste alia gento, la "grekanoj". Ili estis rifuĝintoj alvenintaj en Hispanion post la konkero de Konstantinopolo fare de la otomana imperio en 1453.

Kompreneble, la historio de la cigana gento ne komenciĝis kiam ili alvenis en Hispanion. Genetikaj kaj lingvistikaj esploroj konfirmas, ke romaoj, jen la reala nomo de ĉi tiu gento, venis el hindaj regionoj, verŝajne de la ŝtato Raĝastano. Tamen, la veraj kialoj de ties diasporo kaŝiĝas ene de misteraj kialoj.

Iuj asertas, ke ili estis membroj de suba kasto sendita okcidenten por lukti kontraŭ islamanoj. Aliaj opinias, ke ĝuste tiuj islamanoj malliberigis ilin dum tiuj luktoj. Ĉi tiu teorio devenas de rakonto de Mahmud de Gazni, kiu sciigis pri la ekzisto de pli ol 50.000 hindaj malliberigitoj dum la turko-persa invado de tiu regiono. Tamen, tio kio estas ĝenerale akceptita estas la fakto, ke romaoj foriris el Hindio ĉirkaŭ la jaro 1000. En sia disiĝo ili trapasis Afganion, Persion, Armenion kaj Turkion, poste ili eniris en Eŭropon, kaj, kiel dirite, en la jaro 1425 la unuaj grupoj de romaoj alvenis en Hispanion.

Laŭ historiaj studoj, dum la 15-a jarcento troviĝis en Hispanio proksimume 3000 ciganoj. Ili ariĝis en grupoj kun 80/150 homoj, sub la gvidado kaj ordonpovo de viro aŭ de malgranda grupo de viroj, ili estis respektindaj maljunuloj konataj kiel "patriarkoj". Ĉiu grupo estus sendependa unu de la aliaj, tamen ili tenus familiajn rilatojn, eĉ se lontanajn, kun aliaj grupoj.

Ĉar ili vagadis tra la Ibera Duoninsulo oni povas aserti, ke ili estis nomadoj, kies ĉefa viv-rimedo estis sur-strataj spektakloj, praktikado de aŭguraj artoj kaj sporadaj laboroj rilataj al bestoj, ekzemple alnajlado de hufferoj al ĉevaloj.

Tamen, tiu bona akceptado de la cigana gento fare de la aŭtoritatuloj ŝanĝiĝis fine de la 15-a jarcento. Tiel, en la jaro 1499, la Katolikaj Gereĝoj, konsilitaj de la influo de Kardinalo Cisneros, dekretis ordonon, kiu celis asimili ilin kaj detrui iliajn kutimajn viv-rimedojn. Vere, la reĝoj deziris havigi ĉipan labor-forton al teritoriaj senjoroj. Tiel, laŭ oni diris sur tiu dekreto, "ili fariĝus lojalaj servutuloj kiel la ceteraj homoj".

Tiu dekreto de la jaro 1499 estis terura, sur ĝi legeblas:

" Ni ordonas al egiptanoj, kiuj vagadas tra nia regnolando, kun liaj edzinoj kaj idaroj, ke depost nun kaj antaŭ 60 tagoj, ili devos loĝi ĉe konkretaj lokoj kaj labori en konataj oficoj. Do, ili ne rajtas vojaĝadi tra la regnolando. Kaj se ili tion ne faras, ili estos forpelitaj sen rajto reveni; kaj se malgraŭ tio ili revenas, ili ricevos cent vipo-batojn; kaj se ili ankoraŭ ne obeas, iliaj oreloj estos tranĉitaj; kaj se malgraŭ tio, ili tion ne faras, ili estos enkarcerigitaj kaj definitive forpelitaj el la teritorio."

600 jaroj
Cigana Popolo 1425/2025

En la gran mayoría de las frases el verbo indica una acción que se desarrolla en un tiempo determinado (presente, pasado, futuro...) y que es realizada por un sujeto concreto (yo, tú, él ...). Eso está del todo claro, veamos por ejemplo la frase:

• *Li amas vin*

Estamos indicando que se lleva a cabo una acción (amar) y que quien la realiza es él.

Sin embargo, existe una forma verbal que indica una acción de manera general, es decir, no nos informa ni de cuándo se realiza, ni de la persona que la lleva a cabo. Estamos hablando del infinitivo. Así el infinitivo "*ami*" no nos dice nada del momento en que se lleva a cabo, así como tampoco del sujeto que la ejecuta

Sabemos que en esperanto el infinitivo, todos los infinitivos, terminan en "i".

Ami: Amar	*Labori*: Trabajar	*Studi*: Estudiar
Pensi: Pensar	*Ridi*: Reír	*Promenadi*: Pasear

Porque el infinitivo no informa ni del tiempo ni del protagonista de la acción, podemos decir que su función en la oración es muy similar a la de un sustantivo, en tanto que indica un concepto.

En esperanto el infinitivo termina en "i"
Ami, Labori, Pensi, Ridi, Studi, Promenadi...

Ya hemos visto en otras ocasiones que el sustantivo generalmente realiza las funciones de sujeto o de objeto en la oración, así que el infinitivo podrá realizar también esas funciones. Veamos algunos ejemplos:

Actuando como sujeto:

• *Vojaĝi estas lia prefera ŝat-okupo.*
Viajar es su pasatiempo preferido.

• *Paroli lingvojn malfermas pordojn tra la tuta mondo*.
Hablar lenguas abre puertas por todo el mundo.

En este último ejemplo el infinitivo actúa como sujeto de una oración pero a la vez cuenta con un objeto directo "*lingvojn*" que va en acusativo.

Hay que destacar también el hecho de que si queremos atribuir una cualidad a algo que expresamos por medio de un infinitivo, lo haremos no con un adjetivo sino con un adverbio. Ejemplos:

• *Dormi estas necese.* (No decimos: *"dormi estas necesa"*)
Dormir es necesario.

• *Studi estas konvene*. (No decimos: "studi estas konvena")
Estudiar es conveniente.

Ahora bien, distingamos claramente cuando decimos algo de un infinitivo o cuando lo hacemos de un sustantivo. La diferencia es que, como hemos visto, los infinitivos son calificados por adverbios, mientras que los sustantivos lo son por adjetivos. Veamos algunos ejemplos para aclarar esta distinción:

• *Manĝi estas necese* (decimos algo del infinitivo "*manĝi*", se emplea
Comer es necesario. un adverbio "*necese*").

• *Dormi estas necesa ago* (decimos algo del sustantivo "*ago*", se emplea
Dormir es una acción necesaria un adjetivo "*necesa*").

• *Paroli lingvojn estas konvene.* Hablar lenguas es conveniente.
Paroli lingvojn estas konvena afero. Hablar lenguas es una cuestión conveniente.

Para calificar un infinitivo siempre emplearemos un adverbio, no un adjetivo.
***Trinki akvon estas necese* (Beber agua es necesario)**

Actuando como objeto:

Encontramos verbos que casi exigen un infinitivo como objeto de la acción. Pensemos en los verbos "desear, querer, poder, empezar, tener derecho...". Veamos algunos ejemplos de cómo un infinitivo actúa como objeto de la oración:

- *Se ĉiuj krias, ni ne povos ripozi.*
  Si todos gritan, no podremos descansar.
- *Birdoj povas flugi.*
  Los pájaros pueden volar.

Vemos como los infinitivos "*ripozi*" y "*flugi*" actúan como objetos en estas oraciones.

Vi ne devas paroli laŭte ĉe hospitaloj

Hay que mencionar el caso particular del verbo "empezar". Se trata de un verbo que en muchas ocasiones exige emplear un infinitivo tras él. Veamos algunos ejemplos:

- *Cervantes komencis verki Don Kiĥoton en la jaro 1591.*
  Cervantes comenzó a escribir Don Quijote en el año 1591.
- *La arkitekto komencos dezajni novan domon post du semajnoj*
  El arquitecto comenzará a diseñar una nueva casa después de dos semanas.

En estos ejemplos hemos visto la construcción "comenzar + infinitivo", pero hay que recordar que existe el prefijo "*ek-*" con ese mismo significado "empezar a". Así que podríamos haber expresado esas ideas diciendo:

• *Cervantes ekverkis Don Kiĥoton en la jaro 1591.*
Cervantes comenzó a escribir Don Quijote en el año 1591.

• *La arkitekto ekdezajnos novan domon post du semajnoj*
El arquitecto comenzará a diseñar una nueva casa después de dos semanas

A la hora de utilizar "comenzar + infinitivo" o el prefijo "ek-" tenemos total libertad, pero por una simple cuestión de economía del lenguaje resulta más acertado usar el prefijo.

Por cierto, existe el prefijo "ek-" para indicar que comenzamos algo, pero... ¿existe alguna manera de indicar la idea de fin de algo? La respuesta es que, como tal, no existe ningún prefijo o sufijo que indique la idea de fin, sin embargo sí se suele emplear la construcción "fin-...". Así:

• *La masonistoj fin-konstruos tiun domon kiel eble plej baldaŭ.*
Los albañiles terminarán de construir esa casa lo antes posible.

Por otro lado, y como vimos en el caso del infinitivo actuando como sujeto, puede ocurrir que cuando lo empleamos como objeto el infinitivo lleve también su propio objeto. Veamos esta cuestión de manera más clara:

• *Ŝi deziras studi antikvan historion.*
Ella desea estudiar historia antigua.

• *Ili volas viziti mian urbon.*
Ellos quieren visitar mi ciudad.

En estas oraciones encontramos que un infinitivo actua como objeto de una oración: *viziti* en relación al verbo *volas / studi* en relación al verbo *deziras*, y a su vez también el infinitivo cuenta con su propio objeto: *antikvan historion* es objeto de studi / *mian urbon* es el objeto de viziti. Por supuesto solo van en acusativo los objetos que se expresan con un sustantivo al que puede acompañar un adjetivo, pero nunca los infinitivos.

Un infinitivo actuando como objeto puede a su vez contar con su propio objeto.

Mi pripensas aĉeti novan aŭtomobilon
(Yo me planteo comprar un coche nuevo)

Juan Ramón Jiménez
1881 ~ 1958
Nobel-premiito en 1956

La definitiva vojaĝo

... Kaj mi foriros. Kaj restos la birdoj kantante;
kaj restos mia horto kun sia verda arbo
kaj sia puto blanka.

Ĉiujn vesperojn la ĉielo bluos kaj trankvilos;
kaj sonoros, kiel sonoras ĉi-vespere,
la sonoriloj de la preĝejturo.

Mortos la homoj min amantaj;
kaj la vilaĝo iĝos nova ĉiujare;
kaj en tiu flora kaj kalkita angulo de mia horto,
mia spirito vagos nostalgie...

Kaj mi foriros; kaj mi solos, sen hejmo, sen arbo verda, sen puto blanka,
sen ĉielo blanka kaj kvieta...
Kaj restos la birdoj kantante.

Juan Ramón Jiménez

Tradukis: Liven Dek

Vintraj Olimpikoj

Glacihokeo

Skisaltado

Biatlono

Glitŝtonludo

Bobado

Sledado

Liberstila skiado



Arta sketado

Rapidsketado

Alpa skiado

Skikurado

Skio-montogrimpado

Skeletonado

Neĝtabulado

Nordia kombinita

Folioj por praktikado

Vincenzo Tiberio, la forgesita antaŭulo

La unua antibiotiko ne estis penicilino… **sed** arseniko! En 1909, Paul Ehrlich **malkovris** arsenikan **kunmetaĵon** por kuraci gravan seksan malsanon. Ĝi estis venena, sed **pli bona ol nenio**. Tiam ĝi ŝajnis brila rimedo, ĉar ĝi kapablis trafi nur la malsanon kaj ne la malsanulon.

La skota kuracisto Alexander Fleming hazarde malkovris penicilinon en 1928, kiam li forgesis labor-telereton kun bakterioj sur tablo en sia laboratorio. **Formiĝis** sur la telereto verda ŝimo, kaj li rimarkis, ke bakterioj en kontakto kun tiu ŝimo mortis.

Jam 33 jarojn antaŭ Fleming, la itala kuracisto Vincenzo Tiberio faris similan malkovron, kiu tamen restis nekonata. Li naskiĝis en malgranda vilaĝo en 1869, kaj fariĝis kuracisto de la itala **mar-armeo**. Li **iam** rimarkis, ke la ŝimoj troveblaj en akvo-putoj povas kuraci intestajn infektojn, kaj en 1895 li verkis sciencan artikolon por prezenti tiun malkovron. Bedaŭrinde lia laboro ne ricevis atenton, **ĉefe** pro la lingva baro. **Aperinte** nur en la itala, la artikolo neniam atingis la internacian sciencan komunumon. Tiu mirinda malkovro **estus povinta** ŝanĝi la historion de medicino, sed restis kaŝita en la paĝoj de itala armea revuo.

> antaŭulo

Recordemos que el sufijo "-ul" indica a una persona que se caracteriza por lo que describa la raíz de esa palabra. En este caso la raíz es "antaŭ" (anterior). Por lo que la traducción podría ser "persona anterior" o simplemente "antecesor, antepasado".

- *Viaj antaŭuloj venis de nordaj landoj.*
  Tus antepasados vinieron de países nórdicos.
- *Profitu la konojn de viaj antaŭuloj.*
  Aprovecha los conocimientos de tus antecesores.

> sed

Ya sabemos que se trata de la preposición "pero". Aunque también puede traducirse como "sino". Veamos algunos ejemplos:

- *Mi ne konas vian patron, sed vian patrinon.*
  Yo no conozco a tu padre, sino a tu madre.
- *Li ne havas bonan koron, sed kontraŭe.*
  Él no tiene buen corazón, sino al contrario.

> malkovris

Ya hemos visto en varias ocasiones el prefijo "mal-". Indica la idea contraria a lo expresado en la raíz. Así, si el verbo "*kovri*" significa "cubrir", "*malkovri*" sería "descubrir". Pero, y como ya hemos dicho muchas veces, el prefijo "*mal-*" no da idea ni de algo malo, ni inconveniente, ni peyorativo. Se trata simplemente de la idea contraria.

- *Fermi: cerrar*
- *Malfermi*: abrir
- *Dika*: grueso
- *Maldika*: delgado

> kunmetaĵon

Se traduce como "compuesto" y realmente es una palabra compuesta. Veamos cómo se forma:

El verbo "*meti*" significa "colocar en un sitio, meter". De este verbo se forma "*kunmeti*" que se traduciría como "colocar juntando". Y por último se le ha añadido el sufijo "*-aĵ*", que se trata de la cosa originada por la raíz. Así que *kunmetaĵo* da la idea de "una cosa que se ha colocado juntando", es decir: un compuesto.

> pli bona ol nenio

Se traduce por la expresión que también existe en español "mejor que nada".

> Formiĝis

Volvemos a recordar que el sufijo "*-iĝ*" convierte al verbo de su raíz en reflexivo. Así que del verbo "*formi*" (formar) aparece "*formiĝi*" (formarse). Otros ejemplos de este sufijo serían:

- *Fari / Fariĝi* — Hacer / Hacerse
- *Aldoni / Aldoniĝi* — Añadir / Añadirse

> mar-armeo

Se traduce como "armada" o "marina de guerra". Está compuesto por las palabras "*maro*" (mar) y "*armeo*" (ejército). El autor del texto también podría haber utilizado "*mara armeo*", "mararmeo" o "*maro-armeo*".

> iam

Recordemos el famoso cuadro de voces simples. Se trata de una tabla cartesiana en la que uniendo raíces y terminaciones podemos aprender decenas de palabras. En este caso encontramos la raíz *"I"* que da idea de algo indefinido, así como la terminación *"AM"* aplicada al tiempo. Así, la traducción sería "en un tiempo indeterminado" o de una manera más sencilla "alguna vez".

Por cierto, cuando se discute si el esperanto es una lengua artificial o no, hay que reconocer que este cuadro de voces simples sí es un elemento artificial de la lengua internacional.

> ĉefe

Aunque "*ĉefo*" (jefe, principal) no se trata de ningún prefijo, hay que reconocer que su unión a otra palabra la modifica, indicando que se trata del principal de algo. Veamos algunos ejemplos:

- *Ĉef-ministro*: Primer Ministro.
- *Ĉefartikolo:* Editorial de una publicación (artículo principal).
- *Ĉef-episkopo*: Arzobispo.

Convertido en un adverbio "*ĉefe*" se traduce por "principalmente".

> Aperinte

El gerundio en esperanto realiza las funciones de adverbio por lo que debe terminar en "-e". Se forma añadiendo a la raíz verbal las terminaciones "*-ante*" (presente); "*-inte*" (pasado); "*-onte*" (futuro). Veamos cómo se forma el gerundio del verbo "*aperi*" (aparecer):

- *Aperinte* (gerundio en tiempo pasado): Habiendo aparecido.
- *Aperante* (gerundio en presente): Apareciendo (en este instante).
- *Aperonte* (gerundio en futuro): Habiendo de aparecer.

> estus povinta

No es habitual en un texto escrito en esperanto encontrar un verbo en forma compuesta, aunque eso no quiere decir que no existan o que no se puedan utilizar. Simplemente se trata de que cuando escribimos en el idioma internacional, solemos utilizar los tiempos simples en presente, pasado, futuro, condicional o imperativo.

En este caso, y en tanto que la idea que quería expresar el autor necesitaba de un verbo compuesto, encontramos "*estus povinta*" (habría podido). Veamos cómo está formado.

El verbo "*esti*" (ser, estar, haber) aparece en todas las formas compuestas de los verbos. Es similar al verbo "haber" en español, que también lo encontramos cuando vemos el tiempo compuesto de un verbo. En el ejemplo aparece en su forma condicional "*estus*" (sería, estaría, habría).

El verbo "*povi*" (poder) aparece en su forma de participio en pasado, así:

- *Povanta* (participio de presente): que puede.
- *Povinta* (participio pasado): que pudo.
- *Povonta* (participio futuro): que podrá.

Así que "*estus povinta*" puede traducirse por "habría podido". Aunque son un poco rebuscados, aquí van algunos ejemplos de verbos compuestos en sus distintos tiempos con el verbo "*povi*".

- *Se mi multe ekzercus, mi estus povonta venki fortulon.*
  Si yo hiciera mucho ejercicio, podría llegar a vencer a un forzudo.
- *Se mi edziĝus al via fratino, ni estus povinta esti bofratoj.*
  Si yo me hubiera casado con tu hermana, nosotros habríamos podido ser cuñados.

Sude de la provinco Kadizo, ĝuste ĉe la loko kie rivero Barbate fluas en la atlantikan oceanon, stariĝas fiŝkaptista vilaĝo, kiu nomiĝas kiel tiu apuda rivero: Barbate.

Fenicoj alvenis en ĉi tiun zonon fine de la 9-a jarcento a.K. Tie, ili produktis salon por sali kaptitajn fiŝojn, ĉefe tinusojn. En ĉi tiu zono oni malkovris egiptan amforon, tio pruvas, ke tie ekzistis aktiva komerco kun pliaj mediteraneaj popoloj.

Tarŝiŝanoj kaj kartaganoj alvenis poste, ĝis kiam romianoj fondis la urbon Baesippo dum la 2-a jarcento p.K. Ĉi tiu urbo estis menciita de klasikaj aŭtoroj, kiel Plinio aŭ Pomponio Vela. Rilate Romion, Baesippo estis aŭtonoma urbo devigita pagi jaran imposton al imperio. Ĉi tie, oni ellaboris la saŭcon "garum", tre estimata de la romianoj por kondimenti fiŝojn.



Blazono de Barbate

Jam en la 8-a jarcento, tuj post la invado de la Ibera Duoinsulo fare de araboj, ili starigis fortreson ĝuste ĉe la enfluejo de la rivero. Tiu loko ricevis la nomon *Barbat*, ĉirkaŭ tiu kastelo kreskis vilaĝeto, kiu ankaŭ estis nomita kiel la fortreso, tio estas: *Barbat*. Dum la 13-a jarcento, la kastilia reĝo Alfonso la 10-a, la saĝulo, konkeris Barbate. Kun la celo repopoligi la zonon postaj reĝoj liberigis enkarcerigitojn, ili ricevis ter-pecojn.

Dum la 16-a jarcento estis tre oftaj la atakoj de berberaj piratoj kontraŭ marbordajn regionojn. Por defendi la zonon, la reĝo Filipo la 2-a ordonis la starigon de gvato-turoj laŭlonge de la atlantika marbordo en Kadizo. Ĉe Barbate oni konstruis tri turojn. Ankaŭ stariĝis nova kastelo apud la enfluejo de la rivero, kvankam nuntempe

ekzistas neniu restaĵo pri ĝi. Ĉi ĉiuj defendaj rimedoj estis sukcesaj, do baldaŭ alvenis pliaj novaj enloĝantoj, kvankam ĝis la 19-a jarcento Barbate apenaŭ estis malgranda vilaĝeto.

En la jaro 1805 apude okazis la batalo de Trafalgar, tiam britaj ŝipoj venkis franc-hispanan ŝiparon. La ĉefa ekonomia ŝanĝo de Barbate okazis fine de tiu jarcento. Tiam, la familio Romeu komencis ekspluati industrion pri tinus-kaptado, kiu en ĉi tiu zono ricevas la nomon "almadrabon". Dank' al ĉi tiuj investoj Barbate atingis grandajn mon-profitojn kaj iamaniere ĝi moderniĝis. Reĝo Alfonso la 13-a eĉ honorigis membron de la familio Romeu kun ties nomumo kiel Grafo de Barbate. Poste, novaj enladig-industrioj ebligis plibonigon de la fiŝkapta haveno.

Fine de la 20-a jarcento fiŝkaptado malpliiĝis, tamen kreskis turisma industrio. Ĉi tie turistoj serĉas belecon de naturaj pejzaĝoj apud plaĝoj, kelkaj el ili tre konataj de surfistoj, kiel tiu de Caños de Meca. Nuntempe, Barbate estas granda vilaĝo kun pli ol 20.000 enloĝantoj.

Monumentoj

Turo de Meca

Starigita komence de la 19-a jarcento, en simila formo al tiuj gvato-turoj konstruitaj por defendi marbordon. Temas pri signalo-turo, kiu ebligis komunikadon inter distancaj lokoj.

Almadrabo estas tradicia maniero fiŝkpati tinusojn ĉe la kadiza provinco en Andaluzio.

Lumo-turo de Trafalgar

Starigita komence de la 20-a jarcento, ĝi estas 34 metrojn alta. Hodiaŭ ĝi daŭre utilas kiel lum-turo por ŝipoj navigantaj tra la Ĝibraltara Mar-kolo.

Preĝejo de Sankta Paŭlino

Starigita en la komenco de la 20-a jarcento, sur alia ekzistanta de la 16a. Ĝi estis konstruita dank'al financa apogo de la fiŝ-kaptista industrio. Temas pri malgranda sed tre alloga preĝejo.

Akvo-muelejo

Dum la unua mond-milito, pro la neŭtrala pozicio de Hispanio, estis eble eksporti multajn produktojn, inter ili lad-fiŝ-kaptaĵojn. Do, industrioj en Barbate atingis sufiĉe altajn mon-profitojn. Pro tio estis eble konstrui sociajn infrastrukturojn, kiel novan akvo-transportadon. Oni konstruis turon kaj akvo-muelejon.

Festoj

Semajno de la Tinuso

Barbate estas tre konata pro la "almadrabo", tradicia maniero kapti tinusojn trapasantajn la Ĝibraltaran Mar-kolon Do, gastronomia ellaborado de tinuso, konkrete de "ruĝa tinuso" estas arto en Barbate. Tiel, fine de la monato majo ĉiuj trinkejoj kaj restoracioj proponas al klientoj pladojn kie tinuso estas la ĉefa ingredienco.

Karnavalo

Kvankam la plej konataj karnavalaj festoj en la kadiza provinco estas ĝuste tiuj de la urbo Kadizo, en aliaj vilaĝoj ankaŭ estas eble ĝui partoprenindajn spektaklojn. Inter ili tiu de Barbate, ĉi tie Karnavalo estas festo plena je fantazio kaj bon-humuro.

Festo de la Virgulino de Karmen

Kiel en ĉiuj andaluziaj haven-urboj la 16-a de julio okazas festo honore al Virgulino de Karmen. Dum ĉi tiu tago unu el la ŝipoj, elektita per lotado, portas religian figuron de la Virgulino. Ceteraj ŝipoj ĉirkaŭe akompanas per sonorigado de hupoj.

Gastronomio

Kompreneble, Barbate bazas sian gastronomion sur kaptitaj fiŝoj, kaj inter ĉiuj ili elstariĝas la ruĝa tinuso. Ĉi tiu fiŝo kaptita en Barbate estas konsiderata en Japanio kiel frandaĵo, pro tio ĉiujare post la "almadrabo" (tradicia tinusa kaptado), alvenas japanaj turistoj en Barbate, kun la celo aĉeti la plej bonajn ekzemplerojn fiŝ-kaptitajn.

La plej konata plado farita per tinuso estas "*atún encebollao*", ellaborita per freŝa tinuso, al kiu aldoniĝas abundego da cepo, ajlo, origano kaj laŭro, poste ĉio estas kuirita ene de blanka vino.

Aliaj pladoj kiel "skombro kun vermiĉeloj" kaj "flava hundo-fiŝo" pruvas, ke kuirado de fiŝoj en Barbate estas vera gastronomia arto.



Senlima plaĝo en Barbate (Kadizo)

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Elisa López Velasco, malaga instruistino.

Elisa López Velasco naskiĝis en Mollina (Malago) en la jaro 1884. Ŝi studis instruadon en la Universitato de Sevilo. Poste ŝi komencis labori kiel instruistino en la vilaĝoj Villablanca (Onubo) kaj Sanlúcar de Barrameda (Kadizo).

En la jaro 1918 ŝi atingis stipendion por daŭrigi siajn studojn en la "*Residencia de Señoritas*", frata institucio de la "*Residencia de Estudiantes*", kies celo estis promocii universitatajn studojn al tiutempaj virinoj. En la jaro 1925 Elisa López atingis oficialan mon-helpon de la Ministerio pri Edukado, kiu ebligis al ŝi vojaĝi tra Eŭropo (Francio, Germanio, Aŭstrio, Svisio kaj Italio).

En la germana urbo Heidelberg ŝi ĉeestis kurson pri progresema edukado kaj en Ĝenevo ŝi partoprenis en somera kurso ĉe la Instituto Jean Jacques Rousseau, kies celo estis plibonigi la pedagogian agadon de la instruistaro kaj kontribui al progreso kaj disvolviĝo de la scienca pedagogio.

Elisa López Velasco
1884 ~ ¿1936?

Elisa López Velasco fariĝis specialisto pri edukado de la plej infanaĝuloj. Inter la jaroj 1932 kaj 1934, jam denove en Hispanio, ŝi partoprenis en la tiel nomataj "Pedagogiaj Misiejoj". Temis pri projekto kreita de la Ministerio pri Edukado de la respublika registaro, kies celo estis havigi alt-valoran edukadon al infanoj en la plej malgrandaj vilaĝoj tra la tuta

hispana geografio. Partoprenis en ĉi tiu pedagogia projekto pli ol 500 instruistoj, kiuj laboris en 7000 vilaĝoj. Ĉeestis tiujn "misiejojn" tiam infanoj kiuj poste fariĝus gravaj intelektuloj, kiel Maruja Mallo, María Moliner aŭ Carmen Conde. Elisa López Velasco instruis en ĉi tiu projekto la fakon "Desegnadon" en vilaĝoj de la provinco Madrido kaj en Arundo (Malago).

kiel instruistino pri desegnado de la jaro 1910 ĝis 1930. En ĉi tiuj jaroj ŝi instruis en la publika lernejo "Cervantes" en Madrido. El la politika vidpunkto, Elisa López Velasco aliĝis al sindikato FETE-UGT. En la jaro 1931 li estis membro de la estraro de tiu socialisma sindikato.

Kvankam neniu detala informo ekzistas pri kiam kaj kiel mortis Elisa

La programo "Pedagogiaj Misejoj" havigis edukadon kaj kulturon al malgrandaj kaj izolitaj vilaĝoj en Hispanio dum la 1930-jaroj.

Dum tiuj jaroj Elisa López Velasco ankaŭ verkis libron, eldonitan de la prestiĝa eldonejo "Espasa Calpe", ŝi verkis en la jaro 1933 la libron "*La enseñanza del dibujo en la escuela primaria*" (La instruado de la desegnado en la unuagrada lernejo). En tiu verko, ilustrita per bildoj de la aŭtoro mem, ŝi rakontas siajn spertojn

López Velasco, tio tutcerte devis okazi dum la komenco de la intercivitana milito en la jaro 1936. Kaj rilate la internacian lingvon, Elisa López Velasco sendube lernis esperanton dum siaj jun-aĝaj jaroj en Andaluzio, pro la fakto, ke kiam ŝi iris en Madridon por daŭrigi siajn studojn, noto en ŝia aliĝ-dosiero sciigas ke ŝi parolis Esperanton.

Ba! Denove liter-supo!

Nia rilato bezonas paŭzi iomete.
Ne! Ĉi tio jam estas la fino!



La koincidantaj punktoj de Schelling

Ni imagu, ke ni devas elekti ĉu monero falos per sia averso aŭ per sia reverso. Ni povas elekti kiun ajn eblecon, do, reale temas pri 50% el ŝancojn elekti unu aŭ alian. Tamen, ĉi tiu proponata ludo postulas al ni plian aferon, jen, ke nia elekto devas koincidi kun tiu de alia homo ne konata de ni, krome ni ne povas kontakti kun li. Tio estas, ni devas elekti eblecon koincidantan kun lia elekto, kvankam ni ne povas antaŭscii kion tiu ne-konatulo farus. Nu, studoj asertas, ke preskaŭ 90% el homo elektos la averson de la monero. Jen la teorio de la koincidantaj punktoj de Schelling.

Ĉi tiu teorio asertas, ke se ni estas tute liberaj elekti unu aŭ alian opcion, nia decido estas libera kaj tute ne pravidebla. Tamen, se ni pripensas koincidi kun la elekto de alia homo, ni aranĝos nian opcion laŭ tute pravidebla konduto, dependanta de nia kulturo aŭ sociaj kutimoj.

Ni vidu alian ekzemplon:

Ni vidas la apudan kelk-koloran kvadraton. Ene de ĝi aperas 3 sub-kvadratoj verdaj kaj 1 ruĝa.



Se nia elekto dependas nur de nia propra volo, ni ne povas certigi kiu el ili estos elektata. Tamen, se nia elekto devas koincidi kun tiu de ne-konata homo, preskaŭ ĉiuj ni elektus la 3-an kvadraton, tiun kiu havas malsimilan koloron al la ceteraj, do, tiun kiu estas plej okulfrape videbla. Sed, kial? Nu, pro la fakto, ke ni pripensas, ke alia homo farus ĝuste tion.

Laŭ ĉi tiu teorio, sociaj kaj kulturaj kondiĉoj ankaŭ ludas rolon en ĉi tiaj elektoj. Ni vidu: oni proponas al homo ordigi de supre en suben jenajn kolorojn:

Same, ni sciigas al li, ke lia elekto devas koincidi kun alia de ne-konatulo. Nu, tutcerte ili ne koincidos.

Tamen, ni proponu saman elekton al kolombia civitano. Lia elekto devas koincidi kun tiu de alia samnaciano. Preskaŭ tutcerte lia elekto estos jena:



La kialo de ĉi tiu konkreta ordigo ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi tute similas al kolombia flago. Do, la elekto baziĝas sur kultura aŭ socia kondiĉo, li estas kolombiano.

Multaj aliaj eksperimentoj pravigas ĉi tiun teorion. Tiel, imagu, ke oni proponas al du amikoj iri en kinejon je la 18-a horo, tamen oni ne informas al ili en kiun kinejon ili devas iri. Ĉe tiu urbo troviĝas 3 kinejoj, unu ĝuste sur la centra parto de la urbo kaj aliaj 2 sur eksteraj kvartaloj. Ili devas elekti kinejon, tiun lokon devas koincidi kun tiu elektata de la alia amiko. Nu, eksperimentoj montris, ke la kinejo elektita estis tiu troviĝinta ĉe la centra kvartalo.

Fine, jen ebla demando. Kiun celon serĉas ĉi tiu teorio? Ĉu temas nur pri ludo aŭ ĉu ĝi havas praktikan sencon? Nu, ĝi ne estas ludo, la teorio utilas



Thomas Schelling
1921 ~ 2016
Nobel-premiito en 2005

por dedukti kion pensus ne-konata homo okaze de ebla decido. Ekzemple, la sukceso de la socia reto *Facebook* baziĝas sur ĉi tiu teorio. Ni vidu, inter la jaroj 2004 kaj 2010 aperis kelkaj sociaj retoj, inter ili *MySpace, Hi5, Friendster, Orkut, Facebook*... Tamen, la sola kiu sukcesis estis Facebook, kial?

Tio ne okazis pro la fakto ke eblaj uzantoj kviete pristudis la avantaĝojn de unu aŭ alia reto, tute ne. Milionoj da homoj decidis elekti socian reton, kiu siafoje estus elektita de iliaj konatuloj. Ĉi-maniere *Facebook* kreskis pro la fakto, ke temis pri la socia reto kiun ĉiuj imagis elektotan de pliaj homoj. Ne temis do pri elekto kiu bezonis rektan komunikon inter uzantoj.

Flamenko

Rafael Amador Fernández

La pasintan 8-an de februaro forpasis en Sevilo Rafael Amador Fernández, la plej grava reprezentanto de la nuntempa rok-flamenka kunfandiĝo.

Sur ĉi tiuj paĝoj ni kutime parolas pri la tiel nomata "pura flamenko", malofte pri la plej modernaj vojoj sekvitaj en ĉi tiu maljuna arto. Tamen, estas necese agnoski, ke lastatempe ekzistas artistoj kiuj celas unuigi la oldan flamenkon al la plej novaj muzik-stiloj. Unu el ili, sendube la plej grava, estis Rafael Amador.

Li naskiĝis en Sevilo en la jaro 1960. Kune kun sia frato Raimundo kaj Kiko Veneno, li kreis sian unuan muzikbandon en la jaro 1977, ili estis "*Veneno*". En 1978, kune kun sia frato, li fondis "*Pata Negra*", mitan grupon kie kunfandiĝis flamenko, roko kaj blus'. Do, ne temis pri pura flamenko, sed pri kuraĝa kaj aŭdaca miksiĝo kun aliaj muzik-stiloj.

Dum la 80-aj jaroj la bando "*Pata Negra"* eldonis *Guitarras Callejeras* (1985) kaj *Blues de la Frontera* (1987), ĉi lasta disko estas konsiderata kiel mejloŝtono kaj pruvo ke la flamenka arto povas dialogi kun la plej modernaj muzik-stiloj.

Antonio Núñez Montoya "El Chocolate"
1930 ~ 2005

En 1990, jam sen sia frato Raimundo, Rafael Amador eldonis la diskon "*Inspiración y Locura*" kaj en 1995 "*Como una vara verde*". Tuj poste li suferis sanajn problemojn kiuj devigis al li foriri el scenejoj dum kelkaj jaroj.

Poste li kunlaboris kun novaj flamenkaj bandoj, kiel "*Navajita Plateá*". En 2015 oni organizis omaĝ-spektaklon en Sevilo honore al Rafael Amador fare de konataj flamenkaj kaj alistilaj muzikistoj.

Verdire, Rafael Amador estis ponto inter muzik-stiloj, unuavide tute malsimilaj. Laŭ fakuloj, lia gitaro sonis honeste kaj lia voĉo estis miksaĵo de doloro kaj ĝojeco. Lia influo longe daŭros en la historio de la flamenka arto kaj en tiu de la hispana roko, ĉar en ambaŭ stiloj li ĉiam serĉis liberan muzikon sen ia etikedo.

Pasas la vivo

Kaj pasas la vivo, pasas la vivo.
Pasas la vivo kaj vi konscias ke vi ne vivis,
kiam pasas la vivo kaj vi konscias ke vi ne vivis,
kiam pasas la vivo, pasas la vivo.

Viaj revoj kaj esperoj, ĉiuj forgesitaj
viaj revoj kaj esperoj, ĉiuj forgesitaj.
Pasas la vivo, kaj pasas tuj rivero-fluo
kiam rivero enfluas en la maron
kaj mi indiferente iras kien mi estas tirata.
Kaj pasas la gloro, pasas la gloro.
Pasas la gloro kaj nin bindigas granda orgojlo.
sed iam pasas la gloro kaj nin bindigas granda orgojlo,
sed iam pasas la gloro.
Kaj pasas la gloro kaj vi konscias ke pri vi mem
restas eĉ ne memoro.
Kaj vi konscias ke pri vi mem restas eĉ ne memoro.
Kaj pasas la vivo kaj pasas tuj rivero-fluo
kiam rivero enfluas la maron
kaj mi indiferente iras kien mi estas tirata.

https://www.youtube.com/watch?v=Ckulz6XTXnw

HISPANA AMIKARO DE FERVOJISTOJ ESPERANTISTAJ

Fervojista Angulo

La linio 3-a de la Sevila Metroo

fervojista@esperanto.ac
https://hafe-19.webself.net

La unuan linion de la Metroo de Sevilo oni inaŭguris en la jaro 2009. Tiam, temis nur pri la linio 1-a. La originala projekto baziĝas sur 4 metroaj linioj, trairantaj sub la urbo kaj surface tra la metropola areo. Ĝis hodiaŭ, nur tiu 1-a linio funkcias. La linioj 2-a kaj 4-a ankoraŭ estas projektoj, kaj oni komencis la konstruadon de la linio 3-a. Do, supozeble ĉi tiu 3-a linio ekfunkcios antaŭ ol la 2-a.

La konstrulaboroj de ĉi tiu 3-a linio komenciĝis en februaro 2023. Ĝi trairos la urbon norde suden, konkrete de la kvartalo *Pino Montano* ĝis la kvartalo *Los Bermejales*. Ekzistas la ideo plilongigi ĉe la norda parto de la linion ĝis la kvartalo *San Jerónimo* kaj eĉ la vilaĝo *La Rinconada*. Sude, ankaŭ oni povus plilongigi la linion ĝis la kvartalo *Bellavista* kaj la urbo *Dos Hermanas*. Entute, tiu unua projekto de la linio 3-a estas 9 kilometrojn longa. Ĝi disponos pri 24 stacidomoj kaj laŭ kalkuloj, ĉi tiu nova linio povus esti uzata de 37 milionoj da vojaĝantoj jare. Rilate la konstruon, la 3-a linio trapasas la urbon subtere tra zonoj kun tre densa loĝateco, kiel la kvartalo

Macarena kaj *Ronda Histórica,* do, konstruado okazigos grandajn problemojn al aŭtomobil-trafiko de tiuj zonoj. Krome, pro la fakto ke ĉi tiu lino trapasas historian kvartalon, supozeble oni trovos arkeologiajn restaĵojn, ĝis nun jam estas eltrovitaj 40 al-andalusaj tombejoj.

Kiel dirite, la 3-a linio disponos pri 24 stacidomoj, ĝis nun estas konstruitaj tiuj pli proksimaj al kvartalo *Pino Montano* kaj la hospitalo *Macarena,* entute ses. Okulfrape ankoraŭ mankas multe da tempo por ekfunkciigi ĉi tiun 3-an linion. La unuaj kalkuloj asertas, ke tio ne okazos ĝis la jaro 2030.

LA BARILO

La spaco-ŝipo estis enorma kaj potenca. Homoj konstruis kaj lanĉis ĝin en la vakuan spacon. La unua homo kiu atingus Lunon, la unua kiu starigus armeajn bazojn kun misiloj kontrolus Teron. Homoj, kun sia orgojlo kaj siaj timoj, atingus la stelojn. Tie troviĝis spaco-ŝipo kun siaj fajraj tentakloj. Poste, ĝi mortis. Ĉe tiuj regionoj malplenaj kaj nigraj, io ne-videbla levis sian gigantan manon kaj detruis la ŝipon.



La spaco-ŝipo, deturniĝita de sia vojo, brulis kiam ĝi denove trapasis la teran atmosferon. Ĝi falis sur la nordon de la atlantika oceano. Tiam leviĝis granda ondo.

La spaco-ŝipo falis. La inĝeniero kiu konstruis ĝin renkontiĝis kun militestroj kaj kun la prezidanto.

Sinjoroj, mi tute ne scias kio okazis. La ŝipo estas detruita, sed mi vere ne scias kio okazis.

Ĉu eble kulpas la Orienta Alianco?

Probable, ni ĉiuj scias, ke dum la lastaj jaroj okazas malvarma milito inter ni kaj ili.

Ne temas pri sekreto ke ili konkurencas kun ni.Ankaŭ ili deziras iri en Lunon.

Ni venkos ilin en ĉi tiu kariero. Nia spiona servo asertas, ke ili ankoraŭ ne kapablas sendi tiajn ŝipojn.

Jes! Ni fine iros en Lunon.

Profesoro Enrik ve-spiris. Militoj ĉiam militoj. Homo vojaĝas en la stelojn kaj ili ankoraŭ estas kiel infanoj luktante unu kontraŭ alia.

Profesoro Enrik, vi devas konstrui novan ŝipon kiel eble plej rapide. Ĉi-foje ĝi estos armita. Ĉu vi estas preta eklabori tuj?

Ŝajnas ke mi ne povas fari ion alian

Ne, la profesoro ne povis fari ion alian. Li ricevis ordonojn eklabori tuj. Baldaŭ la skeleto de la nova spaco-ŝipo estis preta.

La spaco atendas nin kaj ni respondas per armita ŝipo. Ĉi tio estas granda bedaŭro.

Profesoro, komprenu ke ni devas esti la unuaj atingi Lunon.

Jes, generalo. Sed ni unue devas trapasi tiun strangan barilon, aŭ...

Aŭ...kio? La profesoro ne finis sian frazon. Nu, la barilo estis problemo de militestroj kaj politikistoj.

VOOOM

Jes. La profesoro finis tuj sian laboron. Baldaŭ venis tago kiam nova spaco-ŝipo levis sian fajrajn tentaklojn survoje en Lunon.

Detrui!!! Kiel diris la profesoro, la homaro nepre devas trovi alian manieron solvi siajn problemojn.

La spaco-ŝipo revenis kaj en la laboratorio de la Profesoro ĉiuj serĉis solvon. Dume, en alia loko de la Tero...

Sciencistoj de la Orienta Alianco konstruis sian propran ŝipon, kun la sama celo. Iri en Lunon.

Sed la rezulto estis identa. Alia spaco-ŝipo konstruita de homoj ne sukcesis trapasi la barilon.

Ĉe la Okcidenta Alianco nenion oni sciis pri tiu nova ŝipo sendita de la orientanoj. Tiam, ĉi tiuj sendis diplomatan plendon.

Haltigi eblan militon... profesoro Enrik kontaktis kun Prof. Petrov de la Orienta Alianco. Trovi solvon al la problemo povus eviti eblan militon.

Se via aparato sendas sufiĉan forton negativan, la rezulto povus esti la nuligo de la elektra kampo.Ni provu!

Nu, inĝenieroj denove eklaboris sur la Stelfajro 2, tamen ĉi-foje ili laboris kune kun fakuloj de la Orienta Alianco.

Kvankam malamikoj, ili ĉiuj faris grandan laboron, do post kelkaj monatoj la tasko jam estis plenumita. Tiam venis la momento...

...starti la motorojn de la ŝipo. Ene de la ŝipo troviĝis fakuloj de ambaŭ aliancoj, pretaj trovi definitivan solvon.

Sinjoroj, ni baldaŭ vidos ĉu la nova instrumento kapablas trapasi la barilon.

Se ni bone kalkulis, granda kvanto da elektronoj kapablos nuligi la forton de la elektra kampo.

Nun !!!

VING

VOOOM

Sparka energio kapabla konkuri kun Suno mem puŝis la ŝipon. Ene de ĝi homoj tremis. Ĉirkaŭe ĉio estis vakua spaco.

Mi trovis tie apertitan truon. Ĉu ni povos trapasi ĝin sukcese?

Mi tio jam pristudis.

Ni havas gviditajn misilojn. Ni metos en unu el ili ĉi tiujn simiojn kaj ni ĵetos ilin. Se ili trapasas, ni iros poste.

Ene de kaĝeto kelkaj simioj estas lanĉitaj rekte en la apertitan truon.

Vidu la truon !!!

La misilo trapasis ĝin

Tamen, ni ne scias kio okazis al simioj. Ni ne estu tro optimismaj. Mi revenigos la misilon ĉi tien.

Ĉio okazis laŭ iliaj pripensoj. Ekzamenoj montris ke la simioj bonfartis, kvankam ili estis ege maltrankvilaj. La profesoroj decidis enirigi la ŝipon en la truon.

Malgraŭ ĉio, ŝajnis ke homoj fine povus konkeri Lunon. Tamen, la prof. Enrik ne estis fiera. Li estis timema. Tiam, subite, liaj nervoj streĉiĝis.

Generalo! Vidu! Rapide!

Tuj, alia spaco-ŝipo aperis. Ĝi estis plata kaj enorma. Ĝi alvenis je ne-posibla rapideco kaj en ĉiu movo ĝi montris minacantajn dezirojn.

Alia spaco-ŝipo! Profesoro, tio tute ne eblas!

Profesoro Enrik observis la radar-ekranon

Kompatinduloj! Ili komprenis nenion. Eĉ kiam la profesoro provis klarigi al ili, ke homo neniam povus atingi la stelojn.

Profesoro Henrik turnis sian kapon, li respondis...

La respondo de la profesoro estis evidenta kaj facile komprenebla. Li simple montris ion per sia fingro...

Ĵus aperis !



GADIR

Aŭtoro: Jorge Camacho
Eldonejo: Loto Azul, Madrido.
Eldon-jaro: 2025
Paĝoj: 125
ISBN 9791387571917
Dulingva poemaro en la hispana kaj en esperanto.
Prezo: 14'25 €.

Laŭ la aŭtoro, viziti unuafoje la urbon Kadizon kaj reveni poste en aliaj okazoj, ne lasas indiferenta. Inter la urbo kaj la Atlantiko, inter la nuntempaj vizitoj kaj tiuj de antikvaj tempoj apartenantaj al familia historio, aŭ eĉ pli diste, la fenica kolonio aŭ la geologiaj stratoj, la observanto sentas la neceson doni ateston pri sia pasado kaj pri la impresoj kaj sensoj ricevitaj. Tiuj poemoj de la jaro 2012 estis verkitaj unue en esperanto kaj poste en la hispana lingvo. Tiuj de la jaro 2022 aperis unue en la hispana, eble iu paralele en ambaŭ lingvoj. Rilate la marajn poemojn de la tria parto estas eble trovi tiujn tri eblojn.

REKVIEMO POR HISPANA KAMPARANO

Aŭtoro: Ramón J. Sender
Tradukita de Antonio Valen.
Eldonejo: Mondial, Novjorko.
Eldon-jaro: 2025
Paĝoj: 67
ISBN: 9781595695178
Prezo: 12 €.



Lerte konstruita romaneto per kiu ni ekkonas la pensojn kaj memorojn de pastro antaŭ rekviemo por junulo murdita tuj antaŭ la Hispana Enlanda Milito. La tradukon faris la fama esperanta verkisto Antonio Valén

nun ni

junularaj paĝoj

ajeu

ajeu@esperanto.ac

Kio estas PASPORTA SERVO? Ĝi estas adresaro de homoj el la tuta mondo eldonita de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiuj proponas al posedantoj de ekzemplero de tiu listo gasti en iliaj hejmoj senpage. Kompreneble kontakto inter gastiganto kaj vizitanto fariĝas per esperanto.

La ideo naskiĝis en la jaro 1966, laŭ propono de la argentino Rubén Feldman González. En la jaro 1974 aperis 40 gastigantoj en tiu adresaro. En 2008 TEJO anoncis lanĉon de nova interreta versio de Pasporta Servo, sub la nomo Pasporta Servo 2.0. Nun la adresaro ne plu aperas laŭ papera versio, sed kiel interreta platformo.

Por uzi ĉi tiun gastigan servon estas necese aliĝi. Vi povas fari tion sur la TTT-paĝo https://www.pasportaservo.org (estas necese esti almenaŭ 16-jaraĝa). Nuntempe la reto de Pasporta Servo havas proksimume 2400 gastigantojn en 121 landoj, kiuj proponas senpagan gastigadon en pli ol 1700 urboj en la tuta mondo.

PASPORTA SERVO es un servicio de alojamiento gratuito propuesto en 1966 y en funcionamiento desde 1974, que ofrece poner en contacto a personas que hablan esperanto y que facilitan alojamiento gratuito a visitantes que hablen la lengua internacional durante sus viajes. Al comienzo se trató de un directorio, pero desde el año 2008 se ha convertido en una plataforma en la red en la que cualquier interesado que hable esperanto puede darse de alta (https://pasportaservo.org). Son 2400 de 121 países de todo el mundo las personas que ofrecen este alojamiento gratuito entre esperantistas. Para hacer uso de este servicio es necesario ser mayor de 16 años.

La teorio Nakamura



Para aquellos que quieran iniciarse, o mejorar, su conocimiento del idioma internacional esperanto queremos informaros del curso gratuito *"La teorio Nakamura"*, al que podrás acceder en el portal Lernu.net. A través de la historia sobre la que se desarrolla el curso podrás iniciarte y adentrarte en esta lengua y poder comunicarte así con personas de todo el mundo.

Para participar no es necesario tener ningún conocimiento previo. Tan solo un ordenador y conexión a internet. El curso está compuesto de 26 lecciones, cada una cuenta con una serie de actividades y ejercicios que te ayudarán a fijar los conceptos y a mejorar tu dominio del esperanto. Ah, y por supuesto el curso es totalmente gratuito: https://lernu.net/kurso/nakamura

¿Quieres aprender algunos verbos útiles?

Kuiri

Doni

Balai

Salti

Aĉeti

Kuri

ajeu@esperanto.ac

ŜAKO

Aroko

AROKO estas movo en ŝako. Ĝi estas speciala, temas pri la sola movo, en kiu partoprenas du pecoj, tio estas: reĝo kaj turo.

Por aroki estas necese:

- Nek reĝo nek turo partoprenanta en la aroko ĝis nun estis movitaj.
- Kvadratoj inter ambaŭ pecoj estas liberaj, tio estas, neniu alia peco troviĝas sur ili.
- La kvadratoj trapasataj aŭ celata de la reĝo ne povas esti minacataj.
- Reĝo ne povas esti minacata de ŝako en la komenco aŭ kiel rezulto de aroko.

AROKO MALLONGA (notita kiel 0-0)

Reĝo saltas je du kvadratoj dekstren, turo je du maldekstren.



Movo de ambaŭ pecoj dum aroko mallonga.

AROKO LONGA (notita kiel 0-0-0)

Reĝo saltas je tri kvadratoj maldekstren, turo je tri dekstren.



Movo de ambaŭ pecoj dum aroko longa.

Fina situo de pecoj okaze de aroko longa.

Laŭ la regularo de FIDE (Internacia Federacio de Ŝako), la unua peco movita dum aroko (do, ankaŭ tuŝita de la ludanto) devas esti reĝo, poste turo.

Kompreneble, ĉiu ludanto elektas aroki aŭ ne, same sur kiu flanko aroki. Ekzistas neniu regulo asertanta, ke oni devas aroki kiel eble plej baldaŭ post la komenco de ludo, tamen aroki signifas protekti reĝon antaŭ solida peon-defendo.

Pro tio, ofte, aroko estas parto de aperturo, pro la fakto ke oni atingas du celojn, unue la ludanto movas sian reĝon en plej sekuran lokon, alie, oni metas turon sur loko pli aktivan, tiel, turo eĉ povas ŝaki la kontraŭan reĝon okaze de aroko.

Kiel kuriozaĵo ni devas diri, ke foje eĉ grandaj ŝak-ĉampionojn dubas pri kiamaniere aroki. Tre fama ĉe la ŝak-mondo estis ludo inter Victor Korchnoi kaj Anatoli Karpov en la jaro 1974. Dum tiu ludo Korchnoi dubis ĉu oni rajtis aroki kiam turo estas minacata kaj tion li mem devis demandi al arbitracianto. Li respondis, ke oni rajtas aroki kiam turo estas minacata, ĉar regulo pri minacoj dum aroko nur rilatas al reĝo.

Fine, jen ekzemplo de ludo, kie blankoj arokas baldaŭ, do ili protektas baldaŭ sian reĝon pere de aroko, male nigroj ne arokas kaj ili lasas sian reĝon ĉe danĝera pozicio.

1. e4, e5.
2. Ĉf3, Ĉc6.
3. d4, exd4.
4. Ĉxd4, Dh4.

Nigra damo atakas centran blankan peonon kaj poste eĉ reĝon. Tamen, ne estas konvene ludigi tiel baldaŭ damon.

5. Ĉc3, Kb4.
6. Dd3, Ĉf6.
7. Ĉxc6, dxc6.
8. Kd2, Kxc3.
9. Kxc3, Ĉxe4.
10. Dd4, De7.
11. 0-0-0, Dg5+

Post 11. 0-0-0, Dg5+



Aroko longa

12. f4, Dxf4+.
13. Kd2, Dg4.
14. Dd8+, Rxd8.
15. Kg5+, Re8.
16. Td8 ++

Skolta Mondo

Sciate, ke skoltismo estas grandega junulara movado, komencita en Britio en la jaro 1907. La vorto "skolto" venas el la angla vorto *scout*, kun la signifo "esploristo". Nuntempe, la skolta movado havas pli ol 25 milionojn da junuloj kaj plenkreskuloj, ĉi lastaj kiel apogantojn de la junulara agadoj.

Robert Baden Powell
1857 ~ 1941

La fondinto de skoltismo estis la brita Robert Baden Powell. Kvankam li ne parolis la internacian lingvon, li menciis nian lingvon sur kajero eldonita en la jaro 1907. Tiam Baden Powell konsilis al geskoltoj uzi Esperanton kiel «patrolan sekretan lingvon». Bedaŭrinde ĉi tiu mencio pri la internacia lingvo malaperis en postaj eldonoj.

Kompreneble Esperanto estis lernata de kelkaj skoltoj en la komenco de tiu movado. La unua paŝo por starigi Skoltan Esperanto-Ligon okazis en 1918, post la apero de broŝuro verkita de Alexander W. Thompson, kiu proponis ĝin. Ekde tiam SEL okazigis siajn proprajn internaciajn tendumadojn kaj seminariojn, kaj partoprenis en multaj naciaj kaj internaciaj ĵamboreoj (granda internacia kunveno de skoltoj). Alie, preskaŭ en ĉiu Monda Ĵamboreo SEL starigas budon por propagandi la internacian lingvon.

Ni bonvenigas novan brancon en nia revuo sub la nomo "Skolta Mondo". Ĝi pritraktos interesajn aferojn rilatajn al skolta movado.

Unu el la ĉefaj celoj de la skolta movado estas eduki infanojn kaj junulojn kiel agadi memstare kaj samtempe kiel kunlabori labori skipe. Akiri praktikajn lertecojn estas esence, tiel ili povos disvolviĝi en la naturo. Do, skoltoj lernas legi mapojn kaj uzi kompasojn. Hodiaŭ ni vidos kiamaniere trovi la nordan kardinalan punkton sen plia helpo ol simpla bastoneto. Jen efika maniero, konsilinde faru ĝin tuj post la sun-eliro.



1. Enbatu stangon en la teron. Rigardu la ombron kaj marku ties finon.



2. Atendu 20/30 minutojn kaj faru tion denove, markante la novan punkton sur la ombro.



3. Unuigu per longa linio ambaŭ punktojn. La punkto 1 indikas la okcidentan kardinalan punkton. La punkto 2 la orientan.

4. Stariĝu post tiu linio. Metu vian maldekstran piedon post la punkto 1 kaj vian dekstran piedon post la punkto 2.

5. Starigita post la linio, antaŭ vi troviĝas nordo, post vi, sudo.





Andaluzia Kuirarto

Kalmaroj laŭ la malaga stilo

Malago estas provinco esence ligita al la Mediteranea Maro kaj al ties eksterordinara fiŝ-kaptita abundo. Do, en la apuda maro estas eble kapti sardinojn, engraŭlojn, triglojn, kalmarojn kaj multajn aliajn speciojn.

Kompreneble, la malaga gastronomio intime rilatas al ĉi tiu abundo. Malagaj receptoj kie ĉefrolas fiŝoj estas simplaj kaj facile kuireblaj. Ĉefe ili estas fritaĵoj aŭ stufaĵoj.

Hodiaŭ ni prezentas bongustegan pladon. Temas pri stufaĵo de kalmaroj laŭ la malaga stilo.

Jen la ingrediencoj:

- Kalmaro, tranĉita laŭringe (200 gr.)
- ½ da malgranda cepo.
- 2 ajleroj.
- ¼ da itala kapsiko
- Tomato pistita (3 kuleregoj).
- Faruno (1 kulero).
- Dolĉa papriko (1 kulereto).
- Fiŝ-buljono (300 ml).
- Petroselo.
- Salo.
- Nigra papriko.
- Oliv-oleo

Cepo

Kalmaro

Itala kapsiko

Ajlo

Dolĉa papriko

Pistita tomato

Oliv-oleo



Fiŝ-buljono

Petroselo

Salo

Nigra papriko

Jen la elaborado:

1) Haketu cepon, ajlerojn, kaj la italan kapsikon. Poste fritetu ilin, iomete, ene de kaserolo kun iom da oliv-oleo.

2) Post kelkaj minutoj, aldonu farunon kaj petroselon. Daŭrigu la fritadon, ĝis kiam faruno estos rostita.

3) Aldonu dolĉan paprikon, miksu ĉion ene de la kaserolo

4) Aldonu pistitan tomaton, salon, nigran paprikon kaj la kalmaron.

5) Verŝu fiŝ-buljonon. Proksimume dum 40 minutoj lasu la tutaĵon super mezforta fajro.

6) Post 40/45 minutoj jam estos preta. Aldonu iomete da petroselo sur la kuiraĵo.

BONAN APETITON!

En la urbo Ubedo (Jaena provinco) stariĝas bela palaco, konstruita meze de la 16-a jarcento laŭ renasenca stilo. Ĝi estas konata kiel la "Domo de la Turoj" aŭ la Palaco de la Familio Dávalos. Hodiaŭ ĝi estas la sidejo de supera art-lernejo.

Tiuepoke, fine de la 16-a jarcento, loĝis S-ro Martín, kavaliro de la Ordeno de Santjago. Li estis riĉa homo, proksimume 40-jaraĝa, kaj post partopreno en dekoj da bataloj li deziris retiriĝi en sian palacon kaj tie edziĝi.

Virino elektita de li estis Ana de Orozco. La plej bela junulino en la urbo. Ŝi estis 17-jaraĝa, blonda kaj bluokula. Kvankam ŝia familio estis sufiĉe altranga, ŝia patro komprenis ke geedziĝo kun kavaliro de grava milita ordeno estus avantaĝo por ili el la socia vidpunkto. Do, okulfrape amo inter ontaj geedzoj ne estis la ĉefa kialo de tiu geedziĝo.

Antaŭ ol ĉi tiu geedziĝo, Ana de Orozco subtenis am-rilaton kun juna servisto laboranta ĉe sia familio. Edziniĝi al li estus tute ne-eble, pro

la soci-klasaj diferencoj de unu kaj alia. Malgraŭ tio, ili parolis pri ebla onta geedziĝo, se la kavaliro mortus okaze de nova partopreno en milito.

Laŭdire, la am-korespondado inter Ana de Orozco, jam ezdino de Martín, kaj la juna servisto daŭriĝis, ĝis kiam unu el tiuj leteroj venis en la manojn de la edzo. Tiam li, ĵaluza pri sia honoro, pripensis teruran venĝon. Li vestigis sian edzinon en monaĥina kostumo, poste li ordonis al masonisto malfermi truon en muro de la palaco kaj enmurigi ŝin.

Ekzistas alia versio de la okazintaĵoj. Tiel, post la geedziĝo Ana de Orozco komprenis ke la rilato kun la juna servisto ne povus daŭriĝi. Pro tio, kaj profitante milit-ekspedicion de sia edzo, ŝi petis al sia eksa amanto veni en palacon por sciigi al li pri la fino de tiu am-rilato.

Laŭ ĉi tiu versio, la juna servisto freneziĝis, li murdis la junulinon kaj poste li enmurigis ŝin en la palaco. Vidite, ke ambaŭ versioj finiĝas per la enmurigo de la juna edzino.

Nu, kiam la kavaliro revenis, li estis informita de la servistaro pri la malapero de sia edzino. Ankaŭ ili sciigis al li pri la ekzisto de eksa amanto. Tiam la kavaliro ordonis venigi la serviston, kiu, malgraŭ turmentoj, neniam konfesis kio okazis al junulino.

Jes, leganto pravas. Verŝajne ĉi tiu historio estas tute simila al aliaj legendoj pri kavaliroj, belaj junulinoj, ĵaluzoj kaj enmurigo. Sendube jes!

Tamen ĉi tiu historio daŭriĝas, komence de la 20-a jardeko. Tiam la palaco de la Familio Dávalos apartenis al Urbodomo de Ubedo, kiu la pasintan jarcenton projektis ripari kelkajn lokojn de la palaco. Dum la laboroj aperis surprizo. Kiam masonistoj laboris, aperis ene de muro kadavro. Temis pri virino vestita en monaĥina kostumo. Ŝi havis juvelojn, do supozeble, temis pri altranga damo. Kompreneble tiumomente, ĉiuj memoris la legendon kaj oni asertis, ke temis pri Ana de Orozco.

Krucvorto



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2								
3					■		■	■
4								
5				■				
6			■					
7								
8						■		

HORIZONTALE

1. Pika kaj mallonga batalilo, adaptebla al la tubo de fusilo.
2. *(Plurale)* Definitiva formo de la plenkreska insekto.
3. *(Inverse kaj sen la lasta vokalo)* La organo de aŭdkapablo. ■ Finaĵo de sustantivoj.
4. Ekscesa aŭ patologia emo al seksaj afero.
5. *(Sen la lasta vokalo)* Portebla, senkovrila, ligna kuvo. ■ *(Akuzative)* Multevalora metalo.
6. La plej grava renkontiĝo de la esperantistaro. ■ Herbo, kiu estas uzata, inter alie, por nutri ĉevalojn.
7. *(Inverse kaj plurale)* Rezin-esenca sekrecio de arbo, pasintece utiligata kontraŭ iuj haŭtmalsanoj.
8. Memmasturbado. ■ Mi kaj vi.

VERTIKALE

A. Ujo el ledo aŭ plasto por teni biletojn.
B. *(Akuzative)* Unu el la kontinentoj.
C. *(Akuzative)* Tempomezurunuo, egala al la daŭro de unu kompleta rondiro de Tero ĉirkaŭ Suno. ■ *(Inverse kaj sen la lasta vokalo)* Patro de mia patro.
Ĉ. *(Inverse)* Ceremonia vira vesto de la romianoj. ■
(Inverse) Apartenanta al vi kaj al mi.
D. Vi kaj mi. ■ Unu el la ŝtatoj de Usono.
E. *(Inverse)* Laŭ propra opinio aŭ gusto.
F. *(Inverse)* Sufikso esprimanta pasivon por ankoraŭ ne okazinta procezo ■
(Akuzative) Pagilo aŭ difinita kvanto da tiu pagilo, uzata kiel interŝanĝilo en aĉeto kaj vendo.
G. Interjekcio esprimanta doloron aŭ amaran bedaŭron. ■ Stiligita pentraĵo sur ligna tabulo, reprezentanta Kriston aŭ sanktulon, en la ortodokseklezia arto.

Rebuso

Kion vi faros la venontan someron?

Bonan Vojaĝon!

Por iri de Kadizo en Sevilon estas necese trapasi jenajn tri punktojn. La difino de ĉiu punkto aperas sur la maldekstra parto. Sciu, ke Vi komencas la vojaĝon en Kadizo, la punkto 1-a enhavas ĉiujn literojn de la vorto "Kadizo" escepte unu, kiu estas malsimila. Same okazas rilate la punkton 2-an, ĝi havas ĉiujn literojn de la 1-a vorto, escepte unu. Same, rilate la 3-an vorton, kiu enhavas ĉiujn literojn de la 2-a vorto, escepte unu. Fine, Vi atingos la urbon "Sevilo", kiu havas ĉiujn literojn de la 3-a vorto, escepte unu. Bonan vojaĝon!

KADIZO

SEVILO

1. En is-tempo, estiĝi en iu loko aŭ tempo.

2. Unu el la diversaj nomoj sub kiu estas konata aŭtonoma komunumo norde de Hispanio.

3. Viskeca likvo, kiu malsekigas la buŝon.

1. __ __ __ __ __ __

2. __ __ __ __ __ __

3. __ __ __ __ __ __

SOLVO AL LA VORTO-LUDO DE LA PASINTA NUMERO

L	E	G	A	L	I	Z	I
I	N	A	Ŭ	G	U	R	I
C	E	R	K	A	■	E	G
E	■	A	C	■	A	Ĵ	O
A	R	N	I	K	O	■	L
N	O	T	O	■	R	E	O
O	N	I	J	■	E	I	P
J	■	O	N	E	H	■	A

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro	Directiva
Prezidanto / Presidente:	Ángel Arquillos López
Vicepresidente / Vicprezidanto:	Alejandro Burgos Escalante
Sekretario / Secretario:	José Mª Rodríguez Hernández
Kasisto / Cajero:	Carlos Spinola
Voĉdonantoj / Vocales:	Juan Díaz Casado
	Alejandro Pinos Cabello
	Yousef Hamdi el Farouki

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: @AndaluzioEO

Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org

84a Hispana Kongreso de Esperanto

de la 14-a ĝis la 18-a de julio 2026

Provizora programo

Mardo 14/07
10:00/12:00 Akceptado de kongresanoj.
11:30:13:00 Prelego pri Portugalete kaj diversaj informoj (Jesús M. García).
15:30/18:00 Marŝado tra Portugalete. Renkontiĝo ĉe la kongresejo.
18:30/20:00 Interkona vespero.

Merkredo 15/07
10:00/11:00 Prelego. Libroservo. Akceptado de kongresanoj.
11:00/12:00 Prelego.
12:00/13:00 Malfermo de la kongreso.
15:30/18:00 Marŝado ĝis Sestao – Muzeo Rialia – Alta forno. aŭ Suprenirado piede al monto Serantes (452 m).
20:00/21:00 Muzika vespero ĉe la preĝejo de Sankta Maria.

Ĵaŭdo 16/07
10:00/11:00 Prelego. Libroservo.
11:00/12:30 Magio (T. Badía/M. Burrutxaga). Libroservo.
12:00/13:00 Prelego: Unamuno kaj origamo (Susana Zabaco). Libroservo.
15:30/18:00 Marŝado tra Getxo (pr. Geĉo) aŭ La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo. Per publikaj transportoj (Buso+Kablotramo).

Vendredo 17/07
10:00/11:00 Ĝenerala HEF-kunveno.
11:00/12:00 Kunveno de E-organizoj. Kunveno de la HEF-estraro kun E-grupoj.
12:00/13:00 Kongresa fermo.
13:00 Komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo.
15:00/19:00 Perŝipe al Bilbao laŭ la rivero. Suprenirado per kablotramo al monto Artxanda (251 m.). Panoramo de Bilbao. Vizito al malnova kvartalo de Bilbao. Vizito al E-Grupejo.

Sabato 18/07
09:00 Renkontiĝo ĉe la kongresejo. Enaŭtobusiĝo.
09:20/10:00 Vizito al La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo.
10:30/12:00 Forĝejo El Pobal.
12:20 Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibarruri, Pasionaria)
12:30/14:00 Muzeo pri Minejoj
14:30 Komuna bankedo en Portugalete.